**Supplément au N° 613 de SENNACIULO**
**Oka jaro — N-ro 16 — Majo 1956**

# LA VOĈO DE L' KONGRESO

**Eldono okaze de la 29-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — Beograd 24-30 de julio 1956**

## BEOGRAD, LA ĈI-JARA KONGRESURBO DE SAT

Beograd, la ĉefa urbo de Jugoslavio havas tre maltrankvilan historion. Kiel grava vojkruciĝo ĝi estis dum jarcentoj kaj estas ankaŭ nun iaspeca ponto inter okcidento kaj oriento kaj ĉiam estis celo de diversaj multnombraj malamikaj atakoj.

Dum la Unua mondmilito oni ĝin multe detruis sed tamen ĝi vivis kaj la 1-an de decembro 1918 ĝi fariĝis sidejo de la reĝlando Jugoslavio. Samtempe ĝi ankaŭ fariĝis fokuso de progresemaj ideoj por kiuj batalis niaj popoloj gvidataj de la Komunista partio kiu en tiu tempo estis sekreta kaj eksterleĝa organizajo. Dudek tri jarojn Beograd vivis tiamaniere. La historio montris, ke tiu periodo estis nur spirhalto inter du teruraj militoj kies viktimo ambaŭkaze estis nia fiera urbo.

La 27-an de marto 1941 Beograd kuraĝe forĵetis la kontrakton kun faŝismaj landoj, montrante tiamaniere ke ĝi deziras esti libera urbo en la libera lando. Eĉ niaj malamikoj admiris pro tiu fiera kaj honora paŝo kiu denove konvinkis la mondon, ke sur la muregoj de nia urbo neniam estos videbla blanka standardo.

La 6-an de aprilo 1941, matene superflugis la urbon la unua ondo de malamikaj aviadiloj. Sovaĝe kaj ruze ili komencis semi teruron kaj morton. Por la reĝlando Jugoslavio la milito daŭris nur dek tagojn sed por la jugoslavaj popoloj ĝi nur komencis. Tri jarojn kaj duono Beograd estis sub faŝisma teroro. Tri jarojn kaj duono Beograd batalis konscie kaj heroe. Ĝiaj gefiloj multnombre aliĝadis la Naciliberigan armeon kaj kun ĝi ili trapasis preskaŭ tutan nian landon irante malfacilan sed gloran vojon, senĉese batalante kontraŭ faŝistoj kaj enlandaj perfiduloj. La 20-an de oktobro 1944 Beogradon liberigis ĝia Popola armeo, kaj ek de tiu tago Beograd fariĝis la ĉefa urbo de nia nova ŝtato Federacia Popola Respubliko Jugoslavio.

Baldaŭ eksilentis la kanonoj. La Dua mondmilito jam estis historia terurajo, la plej granda en la tuta historio de la homaro; nia urbo estis tre vundita sed ĝiaj loĝantoj kaj aliaj homoj el la tuta lando, precipe gejunuloj, venis en Beograd por helpi ĝian eksteran renaskiĝon kaj evoluon. Kaj vere, dank al ĝis tiam nevidebla entuziasmo de niaj homoj, la rekonstruado de nia ĉefa urbo estis tre rapida, sukcesa kaj efika.



»Albaria« la beograda »ĉielskrapanto«

Hodiaŭ ĝi estas pli bela ol iam, ĝi senĉese evoluas fariĝante moderna metropolo el malgranda kaj primitiva balkana urbo. Ĝin ŝatas ne nur beogradanoj sed la tuta lando ĉar ĝi estis la unua viktimo de la milita atako, kaj en ĝi la Centra komitato de la Komunista partio de Jugoslavio sub gvidado de Marŝalo Tito, faris ŝian historian decidon — levigi niajn popolojn al naciliberiga batalo.



*Centro de Beogrado*

Dum malpli ol kvin postmilitaj jaroj estis konstruitaj 2.189 konstruaĵoj kun 12.302 loĝejoj. De tago al tago pligrandiĝas nia ĉefa urbo kaj jam nun ĝi respegulas nian internan vivon kaj socialistan spiriton de niaj komunaj klopodoj.

Beograd dum tuta sia historio ĉiam estis nekonkerebla urbo, ĝi nun estas la centro de nia kultura, ekonomia kaj politika vivo kaj tia ĝi ĉiam estos simbolo por ĉiuj progresemaj kaj liberemaj homoj.

Nia ĉefa urbo estas tre konata turisma loko. Troviĝanta ĉe la enfluejo de le rivero Sava en Danubon ĝi havas eksterordinaran naturan pozicion. Ek de Placo de Dimitrije Tucović kondukas la strato de Marŝalo Tito al la strato Terazije. En strato de Marŝalo Tito troviĝas la Jugoslavia drama teatro. Terazije

# BEOGRAD, LA ĈI-JARA KONGRESURBO DE SAT



*Centro de Beogrado*

estas vera centro de la urbo en kiu troviĝas belaj kaj modernaj vendejoj, hoteloj, kafejoj, gravaj entreprenoj ktp. Tie troviĝas ankaŭ nia plej alta konstruaĵo, nia ĉielskrapanto »Albanija« kies ekstera aspekto plibeligas la straton kaj faras ĝin pli moderna kaj pli impresa. Maldekstren komenciĝas strato de princo Mihajlo en kiu troviĝas la plej rimarkinda komerca parto de la urbo. La strato finiĝas per la Popola biblioteko, malantaŭ kiu estas la plej bela parko de Beograd nomiĝanta Kalemegdan.

Belega promenejo, »pulmo de la urbo«, Kalemegdan estas tre konata loko kies vizitantoj ĝuas diversmaniere; oni povas promeni inter densaj arboj, admiri la malnovan fortikaĵojn kaj militmuzeon aŭ trovi plezuron observante la enfluejon de Sava en Danubon kaj belegan panoramon de la urba ĉirkaŭaĵo. De Kalemegdan estas videbla la najbara urbo Zemun. En Kalemegdano troviĝas la zooĝardeno, la pavilono de arto kaj la monumento de dankemo al Francujo. Sur la plej alta teraso de bronza skulptaĵo »Heroldo de venko« de Meŝtrović. Sub la muregoj de la fortikaĵo estas la komuna tombo kun bustoj de popolherooj Lola Ribar, Ĝura Ĝaković kaj Ivan Milutinović.

Viziti Beogradon kaj ne viziti Kalemegdanon estas same kiel, ekzemple viziti Parizon kaj ne vidi la Eiffelturon.

Placo de la Respubliko, la ĉefa kaj plej bela placo de la urbo. Tie estas la konstruaĵo de Nacia teatro kaj impona Nacia muzeo. Antaŭ la ĉefa enirejo de Nacia muzeo troviĝas granda monumento de serba princo Mihajlo farita el bronzo kaj marmoro. Ĝin verkis itala skulptisto Enriko Paci. Konata estas la fakto ke la menciita skulptisto mortigis sin pro tiu sia verko; la princo estas rajdanta ĉevalon vestita en parada uniformo, sed senĉapa pro kio la skulptisto de monumento mortigis sin. De Placo de Respubliko oni ankaŭ povas atingi Kalemegdanon irante tra Vasina strato. Tie troviĝas la malnova konstruaĵo de pasinta jarcento kun interesaj elementoj de diversaj stiloj. La unua najbara konstruaĵo estas la matematik-naturscienca fakultato de beograda universitato kaj tuj apud ĝi, troviĝas la estonta kongresejo. La 29-a SAT kongreso okazos en la konstruaĵo Popoluniversitato »Kolarac« kie kutime oni okazigas diversajn kongresojn, solenajn akademiojn, grandajn koncertojn kaj aliajn gravajn okazintaĵojn. Vid' al vide de Popoluniversitato »Kolarac« estas la Studenta parko kie staras monumento de Dositej Obradović kiu estis tre konata serba kleriganto. Tiu parko estas ankaŭ tre agrabla ripozejo.

Ek de Terazije komenciĝas Bulvardo de Revolucio, la plej longa strato en Beograd.

Ĝia komenco baldaŭ fariĝos tute alia ĉar en ĝi estas konstruata tre moderna hotelo kaj jam estas konstruita granda domo de sindikatoj antaŭ kiu estos impona monumento al Marks kaj Engels.

Tie, apud la estonta Placo de Marks kaj Engels estas la sidejo de Centra komitato de komunista partio de Jugoslavio kaj iom antaŭe granda kaj bela konstruaĵo de la Parlamento. Vid' al vide estas la Pionira parko; antaŭ la Dua mondmilito ĉirkaŭ ĝi troviĝis altaj muroj, ĉar ĝi tiutempe estis privata ĝardeno kaj promenejo de la reĝa familio. Oni detruis la murojn kaj nun la Pionira parko estas komuna ripozejo el kiu ĉiam aŭdiĝas gaja ridado de geknaboj. En la Bulvardo de Revolucio troviĝas la jura kaj la teknikaj fakultatoj, la universitata legejo kaj multaj novaj kaj modernaj domoj konstruitaj post la milito.

Tiu ĉi artikolo ne celas priskribi la tutan urbon, cetere tio ne eblas pro manko da spaco. Ĉiuj partoprenontoj de la 29-a SAT kongreso havos okazon vidi kaj ekkoni tiun historian urbon kaj ĝian proksiman kaj malproksiman ĉirkaŭaĵon, ĝiajn homojn kaj iliajn ĉiutagajn klopodojn. La artikolo nur celis iomete priskribi la centron kaj la ĉefan parton de la Blanka urbo kiu ĉiam dum tuta sia brua historio scipovis inde akcepti kaj malamikojn kaj amikojn. La unuajn ĝi atendadis heroe, kun malamo kaj batalo, la duaj ĉiam estis akceptataj sincere kaj varme.

Beograd vin atendas malpacience kaj tutkore, dezirante ke ĝi denove estu ponto inter oriento kaj okcidento sed ĉi foje la ponto de amikeco kaj reciproka interkomprenigo.

La ĉefurbo de Federacia Popola Respubliko Jugoslavio salutas ĉiujn kongresontojn kamaradece kaj bonvene.

Branko M. Radoković
membro de O.K.K.

## PROVIZORA PROGRAMO DE GEKNABA KONGRESETO

**Mardo (24. 7.)**

Antaŭtagmeze: Solena renkonto kun beogradaj geknaboj en la Pionira (geknaba) domo. Vizito al Kalemegdan, trarigardo de beograda fortikaĵo, turo Nebojŝa, enfluo de Savo en Danubon kaj aliaj panoramoj.

Posttagmeze: Vizito al Militmuzeo kaj zoologia ĝardeno.

**Merkredo (25. 7.)**

Antaŭtagmeze: Vizito al monumento en Jajinci. Ekskurso al monto Avala (kun elementoj de skolta orientiĝo helpe de kompaso kaj mapo.). Tagmanĝo en la naturo.

Posttagmeze: Veturado en aŭtodromo. Vizito al lernejo »Boris Kidrič.«

**Jaŭdo (26. 7.)**

Antaŭtagmeze: Ludoj, kantoj, recitaĵoj en la kongresejo aŭ naturo (laŭ la vetero).

Posttagmeze: Duon taga ekskurso al Smederevo.

**Vendredo (27. 7.)**

Antaŭtagmeze: Vizito al radiostacio kaj porinfana dissendado.

Posttagmeze: Komuna foriro al plaĝo, banado kaj konkuroj en akvo. Veturado per boatoj kaj kajakoj.

**Sabato (28. 7.)**

Tutan tagon: Diversaj konkuroj, ludoj kaj amuzo en Pionira (geknaba) urbo.

**Dimanĉo (29. 7.)**

Tutan tagon: Tuttaga ekskurso al Novi Sad.

**Lundo (30. 7.)**

Antaŭtagmeze: Promeno tra la urbo per aŭtobusoj.

Posttagmeze: Komuna arangô en la Pionira domo. Adiaŭo.

Survoje al Beograd esperantistoj en Ljubljana preparas por partoprenontoj al SAT Kongreso en Beograd agrablan antaŭkongresan akcepton.

Detala invitilo kun programo estos sendita al ĉiu aliĝonto al la Kongreso en Beograd.
Pliaj detaloj sekvos en venontaŭ Informilo.




# ĈIUJ ĜISNUNAJ INFORMOJ KIUJ DIFERENCAS DE NUNAJ, NE VALIDAS

Adresoj de OKK:

Sekretario: Maksimović Branko, Banjički Venac, 10, Beograd.

Kasistino: Sofija Virc, Knez Mihajlova 36, Beograd.

Ĉekkonto: 101—T—823 Organizacioni kongresni komitet SAT, Beograd.

Kotizoj:

Por SAT-anoj 2,50 dol. (1200 din)

Por gejunuloj ĝis 20 jaroj 1,50 dol. (450 din)

Por gastoj 3 dol. (900 din)

Geknaboj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon, tamen devas anoci sin al OKK

## PROVIZORA PROGRAMO

MARDO, 24. VII.

Je la 9-a malfermo de la kongresejo, akcepto de kongresanoj, kiu daŭras la tutan tagon ĉe la stacidomo.

Je la 20-a interfratiĝa vespero

MERKREDO, 25. VII.

Je la 9-a Solena malferma kunsido, poste fotado.

Posttagmeze: Vizito de la urbo kaj fabrikoj; fak- kaj frakcikunsidoj.

Je la 20-a Kantoj kaj dancoj de jugoslaviaj popoloj.

JAŬDO, 26. VII.

Antaŭtagmeze: Unua laborkunsido. Laborista universitato

Je la 14-a Duontaga ekskurso.

VENDREDO, 27. VII.

Antaŭtagmeze: Dua laborkunsido. Laborista universitato.

Posttagmeze: Vizito al la urbo kaj fabrikoj. Fak- kaj frankcikunsidoj.

Je la 20-a: Teatraĵo.

SABATO, 28. VII.

Antaŭtagmeze: Tria laborkunsido. Laborista universitato.

Posttagmeze: Vizito al la urbo kaj fabrikoj. Fak- kaj frankcikunsidoj.

DIMANĈO, 29. VII.

Tuttaga ekskurso.

LUNDO, 30. VII.

Antaŭtagmeze: Laborista universitato. Diskuto pri S.A.T.

Posttagmeze: Vizito al fabrikoj. Fak- kaj frakcikunsidoj.

Je la 20-a Gaja vespero. Adiaŭo.

MARDO, 31. VII.

Disiĝo. Foriro al postkongresaj aranĝoj.

MONSANĜOJ:

En la kongresa akceptejo oni povas ŝanĝi monon de ĉiu lando, sed hotelpensionon kaj amasloĝejon oni nepre devas pagi en sia propra lando en propra mono sendante monon pere de banko aŭ per ĉeko al jena ĉekkonto:

»Tekući račun »Putnik« — Beograd, kod Narodne banke Jugoslavije«.

La mono devas atingi Beogradon antaŭ la alveno. Se iu ne povas sendi monon, rilatu kun landa peranto.

Rezervu hotelĉambron nepre ĝis 15. VI. (sen pago por rezervado) per poŝtkarto sendepende de aliĝilo, menciante la kategorion. O.K.K. respondos menciante la ĝustan sumon sendendan. Post 15. VI. ni ne garantias rezervadon.

PROVIZORAJ KONGRESKARTOJ:

Ĉiu aliĝinto ricevos provizoran kongreskarton kiun oni nepre kunportu al Beograd por faciligi la laboron de OKK. Por la prov. kongreskarto vi ricevos slipon kun via konto. Vi estas petataj, tuj kontroli ĝin, kaj pagi la ŝuldatan sumon al la kasisto. Post la pago vi ricevos la kongres materialon.

RABATO POR FERVOJOJ:

La jugoslaviaj fervojoj donas al ĉiuj kongresanoj 50%-an rabaton. Oni pagas tutan bileton ĝis Beograd kaj provizite per atestilo kiun al ĉiuj kongresanoj donos OKK, oni povas revojaĝi senpage. Ni atentigas vin ke vi konservu la alvojaĝbileton ĉar ĝi validos por revojaĝo. Kompreneble oni povas revojaĝi nur laŭ la sama vojo. Por diversaj ekskursoj, rondvojaĝoj ktp. la rabato ne validas. Por alveno ĝi validas de la 15. VII. ĝis la 30. VII; por revojaĝo de la 24. VII. ĝis la 15. VIII.

En aliaj landoj grupoj povas ĝui diversan rabaton, pri kio nepre informiĝu ĉe trafikoficejo en via urbo.

Por rondvojaĝoj tra Jugoslavio validas kutima turista rabato pri kiu povas doni informon ĉiu turisma oficejo.

VIZOJ:

Estas necesaj por ĉiuj landoj, sed senpagaj se oni montras la provizoran kongreskarton. Ili validas 2 monatojn, tamen se iu Konsulejo faros malfacilaĵojn, en Jugoslavio oni facile ricevos plilongigon.

LOĜADO:

Ĉiu kiu anoncas sin en la mendilo (se vi ne faris tion tuj, bonvolu per poŝtkarto rekte al OKK komuniki viajn mendojn), ricevos kuponojn, kiuj troviĝos en la kongreslibro, por amasloĝejo, sed nepre ĝis 1. VII. Post tiu dato estos malfacile rezervi amasloĝejon. Hoteloj rezerveblaj nur ĝis 15. VI.

Hoteloj donas nur pensio on kies prezoj estas:

En hoteloj »A« 3600 din

En hoteloj »B«: 2000—2200 din

En hoteloj »C« 1200—1500 din.

Al la prezoj oni aldonu 60 din. po tago por turista imposto.

Amasloĝejo »A« konsistanta el 2-3-litaj ĉambroj en studenta domo kostas 280 din. ponokte.

En amasloĝejo estas litoj kun litaĵo.

MANĜO:

En amasloĝejo estas litoj kun litaĵo. sime al la kongresejo.

Plena monĝo kostas 700 din. (matenmanĝo 100, tagmanĝo 320, vespermanĝo 280). Sama menuo sen kukoj resp. frukto kostas 600 din. (matenm. 80, tagm. 280, vesperm. 240).

Por infanoj la gepatroj povas mendi kaj pagi duonporciojn.

Manĝado (escepte en hoteloj) estas nedeviga kaj pagebla ĉe O.K.K. ĉe la alveno aŭ anticipe.

TRINKMONO:

En Jugoslavio ne ekzistas deviga trinkmono. Oni povas doni aŭ ne doni laŭ sia plaĉo.

VIZITOJ KAJ EKSKURSOJ:

La beogradaj esperantistoj gvidos la gastojn grupe tra la urbo, al muzeoj, ekspozicioj kaj aliaj vidindaĵoj.

Vizitotaj estas kvar fabrikoj:

— »Ivo Lola Ribar«, maŝinfabriko konstruita post la dua mondmilito fare de entuziasmaj junularaj kaj aliaj laborbrigadoj;

— »Oktobarska Sloboda«, teksaĵfabriko;

— »Prolek«, medikamentfabriko; kaj

—»Zmaj«, fabriko de agrikulturaj maŝinoj, konstruitaj ankaŭ postmilite.

Dezirinde estas ankaŭ en la mendilo menci, kiujn fabrikojn la aliĝanto deziras viziti, por ke oni povu antaŭvidi la grupojn kaj tempon de vizitado.

Pro la tro altaj prezoj de aŭtobusveturado O.K.K. ŝanĝis la planon de ekskursoj.

TUTTAGA EKSKURSO okazos per vagonaro al Novi Sad, ĉefurbo de provinco Vojvodio.

Prezo 650 din. Se anoncos sin pli ol 500 personoj, ni ĝuos 25%-an rabaton.

DUONTAGA EKSKURSO okazos per ŝipo al historia urbeto Smederevo apud la Danubo.

Prezo 300 din.

Bonvolu en la mendilo ankaŭ mencii kiujn ekskursojn vi deziras partopreni.

O.K.K. petas

por la kongresa restoracio kaj ekskursoj laŭeble sendi la tutan sumon aŭ parton al ĉekkonto de O.K.K. — per tio oni grave helpas al O.K.K. Se tio ne eblas, oni povas pagi ankaŭ ĉe la alveno.

Ni atentigas vin,

ke ni ne respondecas pri mankoj pro neprecizaj respondoj en la aliĝilo. Gek-doj

kiuj intencas alveni jam unu tagon antaŭe aŭ dum nokte, estas petataj, informi OKK. Ni akceptos tiujn gek-dojn ĉe stacidomo kaj gvidos en la tranoktejon. Ankaŭ ŝanĝojn en via aliĝilo aŭ mendilo anoncu sufiĉe frue, nepre en aŭ via alveno, por ke ni ŝanĝu ĉion en la kasslipo. Vi per tio grave helpas al flua pritrakto en la akceptejo.

FAK— KAJ FRAKCIKUNSIDOJ :

Estas sufiĉe da loko kaj apartaj ĉambroj por la diversaj kunsidoj. Ni petas tujan anoncon kaj komunikon pri la nombro de partoprenontoj. Kunsidoj estu anoncitaj almenaŭ ĝis la 1. VII. en Beograd.

AKCEPTEJO KAJ KONGRESEJO:

La akceptejo estos en la stacidomo en ĝi funkcios ankaŭ monŝanĝejo la 24-an kaj laŭbezone la 23-an de julio, poste ĝi funkcios en la kongresejo.

La kongresejo estas la Popoluniversitato »Kolarac«, Studenta Placo.

En ĝi funkcios ankaŭ

— informejo,

— poŝtoficejo kun speciala stampilo;

— monŝanĝejo;

— liboservo,

TENDUMEJO en Beogrado ne ekzistas, sed la societo de naturamikoj kun OKK entreprenis paŝojn por adaptigo de iu tereno ekster la urbo. Se ni sukcesos havigi monon, la tendumado kostos maksimume 100 din. po persono kaj 150 din. por aŭtomobilo. Ĉion necesan (inkluzive tendon) oni devas kunporti, je dispono estos nur la tereno kun akvo, lumo kaj aliaj instalaĵoj. Finan informon OKK donos en la julia numero de »S-ulo« kaj »La Progreso«. Okaze ke ankaŭ ĝis tiam ne estos eble, ni informos per poŝtkarto ĉiujn kiuj anoncis sin por tendumado.

INFORMA SERVO

Dum la kongreso funkcios gazetara servo kie reprezentantoj de E-gazetoj ricevos necesajn informojn pri la kongreso.

Krome »Večernje Novosti« (Vesperaj novaĵoj) dum la kongreso dediĉos ĉiutage duonon da paĝo al la kongreso donante nacilingvajn informojn pri la kongreso kaj esperantlingvajn informojn pri ĉiuj gravaj eventoj el la tuta mondo. Ĝi aperas ĉirkaŭ la 17-a horo.

PRELEGOJ EN LABORISTA UNIVERSITATO

Ĝis nun estas akceptitaj du prelegoj: Pri la laborista movado — de k-do Zlatnar Peter kaj pri edukado — de k-do Popović Boja. Mankas ankoraŭ du prelegoj, bonvolu anonci vin.

LA URBA TRAFIKA ENTREPRENO tre verŝajne aprobos le peton doni al la kongresanoj senpagan bileton por ĉiuj linioj.

LIBROSERVO. En la kongresejo OKK organizos libroservon al kiu ĉiu eldonejo povas doni librojn por vendado se ĝi povas sendi ilin en malgrandaj kvantoj registrite (ne kiel pakajoj — pro dogano!!) aŭ kunpoti. La libroservo retenas 20%.

Ĉe la liboservo estos aĉeteblaj specialaj poŝtkartoj kaj glumarkoj.

# EL LA LISTO DE ALIĜINTOJ

AŬSTRIO

Finkenzeller Max kaj Loze, Marek Helena, Pistorius Anna, Jorde Marie (Wien); Hollinger Max, (Linz); Spitzenstetter A. (Innsbruck); Schmid Gustav (Wiener Neustadt) — 8.

BELGIO

Aelst Maurice, Gauvin Jules, Lombaerts Nora (Bruxelles) — 3.

BRITIO

Wolfskehl Elizabeth (Rd. Selsey); Halliday A. (New Ferry); Sulsky Joel (Harpenden); Dunlop Robert (Edinburgh) — 4.

FINNLANDO

Viikki Joel (Somero) — 1.

FRANCIO

Bartelmes Norbert, Bannier Lucien, Lentaigne Leon, Dazun Edmond, Bournazel Roger, Prevos Robert, Bannier Jacques (Paris); Marron Roger (Marseille); Pigault Louise (St Julien de Mailloc); Le Romancer Roger (Le Pouliguen); Boud Francine (Craponne); Michaud Roger; kaj Gisele (Pantin); Sigonneau Andre kaj Jeanne (Ivry); Benazet Rene kaj Claire (Argeles sur mer); Robert Michel (Gien); Enizan Ludviko (Rueil — Malmaison); Dettwiller Jean (Moulins); Nove Andre (Feyzin); Yelland Ernest Edvard (Aspreont AM); Glodeau Simone (Montreuil); Cherie Eugenie (Rubersy par Bernesy); Heligoin Albert, Leontina, Maria (Herblain); Chabriere Henri — 28.

GERMANIO

Dittenheber Kasimir, Doubler Konrad (München); Tietsch Erich (Stuttgart); Pillekamp Hans, Pillekamp Gerda Bunn Georg (Düsseldorf); Pohlhaus Artur (Wuppertal); Harlein Georg, Bloos Georg (Nürnberg); Schwagen Eugen (Asburg); Von der Heid Alfred (Bielefeld); Schmidt Alfred kaj Martha (Russensheim) — 13.

ITALIO

Guzzi Mario (Torino) — 1.

IZRAELO

Dorn Jehezkel (Hashiva) — 1.

JUGOSLAVIO

Maksimović Branko, Sekelj Antonije, Antonijević Ilija, Stojanac Spasa, Obradović Elza, Virc Sofija, Čipčić Stevanka, Kačarević Olga, Dimić Dragomir, Aranicki Milutin, Nikolajević Ante, Stanić Vlasta, Sekelj Ljiljana, Subotić Nedeljka, Vukmanović Petar, Nedeljković Mašica, Jekić Zorica, Marković Milan, Andrić Mika, (Beograd); Županćić Josip, Janković Ladislav, Preksavac Josip, Ana, Stanko, Zdenka, Gaberšek, Zlata, Sarec Branko, Imenšek Krista kaj Mira, Demetrović Marko, Horvat Petar, Švaco Tomo, Tandarić Mirko, Vokoun Franjo, Koren Franjo, Žabkar Alojz, Vajdlih Josip, Eseš Slavko kaj Nada, Obad Geza kaj Dragica, Lončarić Mladen kaj Milica, Debić Franjo kaj Katica (Zagreb); Radovanović Bora, Sauer Vladislav, Moker Lipot kaj Helena, Dr Filip Jovan (Novi Sad); Šlabek Franjo (Novigrad Podr.); Stevanović Toma (Roanda); Mirčevski Trajko (Skopje); Rašić Djordje, Milovanović Dragiša kaj Ruža; (Kragujevac); Jovanović Miodrag (Deževa); Vulšić Nikola (Okučani); Magajne Just kaj Branka (Karlovac); Bourek Josip (Valjevo); Gregurek Toma (Koprivnica); Karninčić Tjoško, Kortelc Ivo (Split); Belak Lovra (Našički Markovac); Hercek Anjo, Tomislav, Mirjana, Nikšić Mato, Bobić Nevenka, Ulrih Olga, Šikić Ljuba (Slav. Brod); Tarbuk Dragan kaj Ankica, Jovičić Mirko (Banja Luka); Davor Grgat (Krilo Jesenice); Sulentić Mihajlo (Mostar); Neveljić Rogić (Titograd); Gerev Metodi (Jegunovci); Katić Emilija (Nova Gradiška); Jenei Stevan, Martinov Ljiljana, Herčan Suzana (Perlez); Orlović Dragutin (Srem. Mitrovica); Gluvakov Mirko (Zrenjanin); Bojović Milutin (Bileš); Prošić Dragoljub (Dobrljin); Horvat Alojz (Tezno pri Mariboru); Majcen Alojz (Maribor); Mihajlović Borivoj (Pančevo); Kravić Milevca (Prigrevica); Marinović Ante kaj Vilma (Janjina) Rajšić Branko, Karleuša Stojanka (Zemun); Zarić Vida, Maznik Aleksandra (Prnjavor); Rajki Marija, Fodor Hedviga, Jerbić Ana, Domšić Ivan, Kovač Franjo, Pohn Leopold (Sušine Djurdjenovac); Salberg Erich (Selce); Stojnić Stevan, Čulibrk Stevan (Pula); Negovetić Ljudevit (Sarajevo); Popadić Stevan (Trnjane); Givoje Marinko (Ljubljana) — 109.

NEDERLANDO

Huisman Ariaan (Amsterdam); Markus Jan, Mes Goossen Margaretha kaj Helena Buitenen Pieter kaj Hendrika, Slot Leendert (Rotterdam); Kwak Jacob (Vlaardingen); Meijer Karel Hendrik (Den Haag) — 9

SVEDIO

Karlsson Henrik (Kisa); Strom Josef kaj Dagny, Hakansson Asta, Boberg Justo, Anjo, Juno (Enskede); Rosen Folke kaj Ingrid, Ullstrom Karl, Sojander Tor, Leenholm Karl kaj Signe, Broberg Maria (Stockholmo); Paulsson Carl Ivar (Solna); Faubler Albin (Hammaro); Vessel Nils (Stuvsta) — 17.

SVISIO

Führer Manfred (Zürich) — 1.

Entute: 195 el 12 landoj Dum la presado la nombro kreskis ĝis pli ol 350.

Donacoj al O. K. K.:

Marble R. C., Van Nuys, Calif. Usono... 1 dol.

Faltus Rudolf, San Francisko, Calif. Usono..... 1 dol.

Entute: 2 dol.

HONORA PROTEKTANTO DE LA KONGRESO

Kamarado Ĝuro Salaj, prezidanto de Uniiĝo de sindikatoj de Federacia Popolrespubliko Jugoslavio akceptis la inviton de O.K.K., esti honora protektando de 29-a SAT-kongreso en Beograd.

GLUMARKOJ

de 29-a SAT-kongreso

aperis en verda kaj ruĝa koloroj

Folieto de 6 glumarkoj kostas 20 din. aŭ egalvaloro.

Oni povas mendi ĉe OKK, sed ne malpli ol 20 folietojn kun indiko kiom da folietoj oni bezonas el kiu koloro.

Samtempe pagu al ĉekkonto de OKK: 101-T-823 Organizacioni Kongresni Komitet SAT, Beograd, Jugoslavio.

Kníhtlačiareň „Hlas ľudu" Petrovec (Báčka) Jnhoslávia